
Veksilologia revuo en Esperanto

# VENTO

Numero 14 Aprilo 2026



# VENTO

## Veksilologia revuo en esperanto

Eldonita de Veksilologia Esperantista Tutmonda Organizo
kun la kunlaboro de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.

Adresoj: vento@esperanto.ac

Apartado de Correos 3142
E-14080 Córdoba (Hispanio)

*Editada en Córdoba (España) por la Asociación Andaluza de Esperanto.*
Eldonita en Kordovo (Hispanio) de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.

ENHAVO — Paĝo

| | |
|---|---|
| La bantustanaj flagoj | 3 |
| Pri la teksaĵoj de flagoj | 11 |
| 2026 Vintraj Olimpikoj | 13 |
| La fotografaĵo de niaj legantoj | 17 |
| La flago de la Druza popolo | 18 |
| Fiĝioj: malgranda Ŝtato kun multaj flagoj | 23 |
| Lastaj informoj pri flagoj | 26 |
| La flago-krizo de Belfasto | 29 |
| Esperanto-flagoj sur aŭtomobiloj | 33 |
| Veksilologia kuriozaĵo: *Liĥtenŝtejno kaj Haitio, flaga koincido en 1936* | 36 |
| La angulo de la blazonoj: *Vatikanurbo* | 39 |
| Flagoj kaj Poŝtmarkoj: *La Andora Flago* | 41 |
| Trovu la eraron! | 42 |
| Veksilologia Humuro | 43 |

Kunlaboris ĉi-numere: Cristina Bollini, Alejandro Burgos Escalante, kaj José María Rodríguez (red.).

*Ĉi tiu revuo estas tute neŭtrala rilate politikajn aferojn. La apero de flagoj kaj simboloj en la revuo tute ne montras apogon aŭ rifuzon al la ideoj, ŝtatoj, regionoj aŭ asocioj de ili reprezentataj. La sola apogo de nia revuo rilatas al la Internacia Deklaro de Homaj Rajtoj kaj al la adopto de la internacia lingvo Esperanto kiel komunikilo por la tuta homaro.*

# La Bantustanaj Flagoj

*José M. Rodríguez (Hispanio)*

Bantustanoj, ankaŭ konataj kiel *"patrujoj"* (el la angla *homelands*), estis la geografia kaj demografía kolono de la sistemo de rasa apartigo konata kiel «apartismo» en Sudafriko kaj Namibio, ĉi lasta teritorio estis administrata de Sudafriko ĝis la jaro 1990. Bantustanoj estis kreitaj de la registaro de la blankula malplimulto kun duobla celo: senigi la nigrulan loĝantaron de ilia sudafrika civitaneco kaj enŝlosi ilin en etne dividitaj rezervejoj.

La jura bazo de ĉi tiuj teritorioj plifirmiĝis per leĝoj kiel tiu pri Bantuaj Aŭtoritatoj de la jaro 1951. Tiam, la sudafrika registaro argumentis, ke la nigraj sudafrikanoj ne estis reale naciaj plimultoj, sed diversaj etnaj grupoj (zuluoj, kosoj, cvanoj ktp), kiuj devus disvolviĝi "sendepende". El praktika vidpunkto temis reale pri kontrol-strategio, tiel oni asignis apenaŭ 13% de la teritorio al la nigra plimulto, kiu reprezentis ĉirkaŭ 80% de la loĝantaro. Kompreneble la plej fekundaj kaj mineral-riĉaj teroj restis en manoj de la blankula malplimulto.



Flago de Sudafriko (1910~1994)

Ene de la tiama flago de Sudafriko, sub blankula administrado, aperis flagoj de diversaj popoloj, sed ĉiuj kun eŭropa, do ne-afrika, deveno.



Britio



Oranĝa Libera Ŝtato



Transvalo

Inter la jaroj 1963 kaj 1981 la sudafrika registaro entute kreis 10 bantustanojn, el ili, 4 (Transkejo, Ciskejo, Bofutacvano kaj Vendo) estis deklaritaj "sendependaj" ŝtatoj, kvankam verdire neniu lando en la mondo, krom Sudafriko, agnoskis tian statuson. Havigante al ili ĉi tiun falsan suverenecon, la blankula registaro de Sudafriko nuligis la voĉdonrajton de la nigrula plimulto, ĉar, el pure leĝa vidpunkto, ili estis "fremduloj" en Sudafriko. Krome, oni atingis malmultekostan laborforton, ĉar bantustanoj funkciis kiel gigantaj dormejoj. Tiel, viroj vojaĝis en la blankulajn urbojn por labori kaj poste ili revenis en siajn malriĉajn bantustanojn. Fine, oni fragmentigis la politikan reziston kontraŭ la blankula reĝimo, ĉar oni dividis la loĝantaron laŭ tribaj grupoj.

Kiel dirite, fine oni konstituis en Sudafriko 10 bantustanojn, jen kelkaj datumoj pri ĉiuj ili, kaj specife pri ties flagoj.

**• TRANSKEJO**

Temis pri patrujo kreita por la kosa etno, kun ĉefurbo en Umtata kaj pli ol 3 milionoj da enloĝantoj.





Sur la flago de Transkejo aperas tri koloroj: la okra, kiu reprezentas la argilan teron, pere de kiu estas konstruitaj la tradiciaj kabanoj; la blanka, signifanta pacon kaj fine la verda koloro, reprezentanta la verdajn montetojn kie paŝtas la brutaro.

**• VENDO**

Ĉi tiu bantustano estis fondita specife por la vendaoj, kun ĉefurbo en Thohoyandou kaj kun, proksimume 500.000 enloĝantoj.





La strioj sur la venda flago memorigas la tradician standardon de la transvala regiono. La bruna koloro reprezentas la fertilan grundon, la flava kaj la blua koloroj estas la simboloj de ĉielo kaj la suno. La verda koloro reprezentas la riĉan naturon. Meze de la flago aperas la litero V, kiu memorigas la nomon de la bantustano.

**• CISKEJO**

Ankaŭ kreita por la kosa popolo, sed por tiuj kiuj loĝis cis la rivero Kejo, pro tio la diferenco inter Transkejo kaj Ciskejo. Ĉe Ciskejo loĝis 1.000.000 da homoj, la ĉefurbo estis Biŝo.






Sur la flago de Ciskejo videblas blanka diagonala strio sur blua fono. La blua koloro simbolas la ĉielon kaj la progreson. La blanka strio montras la sekvendan vojon, kiun oni devas trairi por atingi tiun progreson. Meze aperas nigra gruo, kiu ĉe la kosa popolo signifas kuraĝecon.

**• BOFUTACVANO**

Establita en la jaro 1977 por la cvana popolo, temis pri teritorio formita de multnombraj enklavoj sen teritoria kontinueco. Entute loĝis en ĉi tiu bantustano pli ol 2 milionoj da enloĝantoj, kiuj havis sian ĉefurbon en Mmabatho.





La signifo de la koloroj de la bofutacvana flago tre similas al tiu jam vidita de Ciskejo. Tiel, la blua koloro simbolas la ĉielan estontecon de la popolo, kaj tiu oranĝa la sekvendan vojon por atingi tiun ĉielon. Nigra leopardo ene de blanka cirklo reprezentas la forton de la cvanoj.

Tiuj bantustanoj antaŭe diritaj estis oficiale deklaritaj kiel "sendependaj" ŝtatoj, tamen tiu fikcia sendependiĝo nur estis agnoskita de la aŭtoro mem de tiuj teritorioj, tio estas la Sudafrika Respubliko, kaj en la kazo de Transkejo ankaŭ de Urugvajo.

Krom ĉi tiuj "sendependaj" bantustanoj, kelkaj aliaj teritorioj sekvis saman vojon, tio estas: utili kiel rezervejoj por etnoj en Sudafriko, kvankam la sekvantaj teritorioj estis deklaritaj nur kiel aŭtonomaj regionoj:

• **GAZANKULO**

Fondita en la jaro 1971 por la conga popolo.



La flago de Gazankulo estas formata de tri strioj, blanka kaj bluaj. La blua koloro reprezentas la senliman ĉielon, la blanka strio simbolas la kooperadon de la conga popolo kun blankuloj. Sur la centro de la flago videblas du kuleroj, reprezentantaj la gastemon de conganoj kaj unuigita ĉeno, kiel simbolo de unuiĝo.

• **NDEBEL-LANDO**

Establita en la jaro 1981 por la etno Ndebela.

La flago de Ndebel-lando estas formata de 3 strioj, blua, flava kaj verda. La blua koloro reprezentas la ĉielon, la flava bendo simbolas la sunan lumon kaj fine la verda estas la reprezento de la fertila grundo de la teritorio. Sur la centro de la flago aperas hakiloj kaj ordon-bastono, tradicia simbolo de la triba povo.



• **ZULULANDO**

Kreita en la jaro 1977, temis pri mult-enklava teritorio por la zulua popolo. Temas pri unu el la plej konataj bantustanoj, kvankam neniam ĝuis sendependan suverenecon, eĉ ne fikcian.



1977 - 1985



1985 - 1994

En la flago de Zululando, unue flirtigita, aperas meze la koloroj de la standardo de la politika partio Nacia Afrika Kongreso. La nigra koloro reprezentas la afrikan popolon, la verda bendo la grundo kaj la ora strio la riĉajn resursojn. Apud la stango troviĝas ruĝa larĝa bendo, kiu estas la tradicia koloro de la zulua popolo. Ene de ĝi montriĝas tradicia ŝildo.

En la jaro 1985 oni ekuzis novan flagon kun la centraj koloroj inversigitaj. Krome, la ora koloro fariĝis flava. Same, depost 1985 aperas sur la flago ne nur ŝildo, sed ankaŭ bastono kaj lancoj.

**• LEBOVO**


Sur la flago de la bantustano Lebovo aperas blua bendo, simbolo de la ĉielo; suba verda strio, reprezentanta la grundon kaj meze leviĝantan sunon, do la vekiĝo de la soza etno.





**• KANGVANO**

Starigita tuj apud la sendependa ŝtato tiame nomita Svazilando kaj nun Esvatinio, ene de ĝi loĝis anoj de la etno svazia. Malsimile al aliaj bantustanoj, Kanvano ne uzis propran standardon, sed tiu de la Sudafrika Respubliko.



**• KVAKVO**

Fondita en la jaro 1974 kiel rezervejo por la basuta popolo. La kvakva flago estas verda, simbolanta la fertilan grundon. Ambaŭflanke aperas du oranĝaj bendoj, signifanta la du triboj el kiuj naskiĝis la basuta popolo kaj ties rilato kun la sudafrikaj koloniantoj. Meze nigra poneo montras la forton de la triboj.

Sudafriko ricevis la administradon de la eksa germana kolonio Sudokcidenta Afriko en la jaro 1919, ĝuste post la unua mondmilito. Sudafriko disvolvis en ĉi tiu teritorio similan apartisman politikon ol tiu plenumita en ties teritorio. Ankaŭ okazis same rilate la fondiĝon de bantustanoj. Do, kiel en Sudafriko, ankaŭ en Namibio fondiĝis tiaj teritorioj depost la jaro 1968. Ĉiuj ili malfondiĝis en 1989, ĝuste antaŭ la sendependiĝo de Namibio.

Jen la bantustanoj de Namibio, eksa kolonio Sudokcidenta Afriko, kaj ties flagoj:


• **OVAMBOLANDO** aŭ **AMBOLANDO**




La flago de ĉi tiu namibia bantustano reprezentas en sia koloro blua, la ĉielon; la blanka bendo simbolas pacon kaj sube la verda koloro la fekundan grundon. Sep kolonoj meze de la standardo reprezentas la sep tribojn de la teritorio.

• **KAVANGOLANDO**

La verda koloro de la flago de ĉi tiu bantustano reprezentas la grundon de la teritorio. La tri centraj strioj havas la kolorojn de la sudafrika flago.





• **LOZILANDO**

La nigra kaj la blanka strioj reprezentas la popolojn de la teritorio. La verda simbolas la grundon kaj la blua la akvon. Du elefantoj, vid-al vide, reprezentas la du ĉefajn tribojn de la bantustano.




**• BOŜMANLANDO**

La nigra koloro estas la simbolo de la boŝmana etno. La oranĝa centra strio reprezentas la dezertojn de la regiono kaj la verda, tiujn partojn de la teritorio kie abundas vegetaĵoj.

**• DAMARALANDO**

La bruna kaj la blanka koloroj reprezentas la grundon de la teritorio. Flanke aperas kruco kun ok brakoj, reprezentantaj tiujn ok tribojn de la teritorio.






**• HEREROLANDO**

La flago de ĉi tiu sudokcident-afrika bantustano estas formata de 3 horizontalaj strioj. Tiu verda reprezentas la grundon de la teritorio; la blanka la pacon kaj la nigra koloro estas la simbolo de la enloĝantaro mem.

**• BASTERLANDO**

"Basters" (bastardoj) estas la nomo de popolo naskiĝinta de la idaro de koloniistoj de Kabkolonio kaj de afrikaj virinoj. En la jaro 1868 ili migris en teritorion de la Sudokcidenta Afriko, kiu fariĝis en la jaro 1979 la bantustano Basterlando, tio estas la "la lando de bastardoj". La flago de la teritorio havas la kolorojn de la tiama germana flago, eŭropa ŝtato kolonianta la teritorion ĝis la jaro 1915. La nigra koloro reprezentas la ne-certan estontecon de la baster-popolo kiam ili migris en la novan teritorion, la ruĝa koloro la lukton kontraŭ aliaj popoloj kaj la nigra centra rektangulo simbolas la pac-dezirojn.





**• CUANALANDO**

Ĉi tiu bantustano, establita por la etno cuana, ne havis propran flagon. Do, estis uzata tiu de Sudafrika Respubliko.



**• NAMALANDO**

Temas pri versio de la Unuiĝinta Reĝlanda flago. Ĝi estis kreita de brita pentristo Thomas Baines, kiu en la jaro 1864 troviĝis en tiu teritorio.

Kiel kunlabori kun VENTO

• Estas bonvenaj ĉiuj kontribuaĵoj al nia revuo. Se Vi interesiĝas pri veksilologio, ne hezitu sendi al ni artikolojn, informojn, desegnaĵojn, fotojn, ktp. La kontribuaĵoj nepre devas esti redaktitaj en la internacia lingvo esperanto kaj pritrakti veksilologiajn aferojn. Se temas pri blazonoj aŭ ĝenerale pri heraldiko, ĉi tiuj simboloj devas aperi ankaŭ ene de flago por tiel konsideri, ke ĝi ankaŭ rilatas al veksilologio.

• Sur ĉiu numero ni aperigos unu aŭ kelkajn fotografaĵojn senditajn de niaj legantoj. Ĉi tiuj fotografaĵoj devas esti originalaj, tio estas, ne povas esti prenitaj el interretaj paĝoj. En tiuj fotografaĵoj devas aperi flago(j). La sendanto devas sciigi pri la loko, kaj se eble ankaŭ pri la dato de la fotografaĵo.

• Okaze de la sendo de artikolo aŭ informo, la aŭtoro devas eviti fari favorajn aŭ malfavorajn politikajn komentojn pri la ŝtato, komunumo, regiono aŭ asocio de la flago. Nia revuo estas tute neŭtrala rilate politikajn aferojn aŭ movadojn.

• La revuo estas tute senpaga, do, pro la sendo de kontribuaĵo oni ricevas nenian kontraŭ-pagon. Kompreneble, la aŭtoro rajtas aperigi siajn personajn datumojn sur la artikolo.

Nia ret-adreso estas: vento@esperanto.ac

# Pri la teksaĵoj de flagoj

✍ *Alejandro Burgos Escalante (Hispanio)*

Ĉiunumere, ni esploras flagojn el la tuta mondo, el ĉiuj epokoj. Ni esploras kolorojn, blazonojn eĉ proporciojn. Unu afero, kiun ĝis nun ni ne priparolis, estas la teksaĵoj utiligitaj por ellaborado de flagoj. Malfeliĉe, temas pri temo ofte preteratentita de flagamantoj. Ne plu! Jene ni esploros la eblajn teksaĵojn por flagoj kaj ĝiajn ecojn.

La materialoj el kiuj flagoj estas ellaboritaj ne ĉiam estis la samaj. Antikve, la teksaĵoj de flagoj dependis de la loko de la grupo. Kelkfoje, lano, alifoje, kotono aŭ lino. Ankaŭ riĉeco estis granda variablo. Ni priesploru ĉiujn teksaĵojn, modernajn kaj antikvajn, ofte uzatajn kaj ne tiom ofte uzatajn:

• **Lino:** vegetaĵa fibro, kiu estis tre populara kaj grava antikve. Hodiaŭ, malfeliĉe, ĝi ne estas tiom ofte uzata, precipe pro la uzado de sintezaj fibroj kaj de kotono, pli malmultekosta vegetaĵa fibro. Lino estas daŭrema kaj sorbema fibro.



Flago de Andoro de la 19-a jarcento farita el lino (Domo de la Valo). Fotografaĵo de la aŭtoro.

• **Kotono**: vegetaĵa fibro, tre populara nun kaj malnun. Antaŭ la elpensado de sintezaj fibroj, kotono estis vaste uzata por ellaborado de flagoj.

• **Lano**: besta fibro el ŝafoj. Ĝi estis uzataj en flagoj; nun ne plu.

• **Silko**: besta fibro delikata kaj brila. Antaŭe, luksaj kaj ceremoniaj flagoj estis el silko. Nun, silko estas malofta teksaĵo, sed ĝi ne tute malaperis.

• **Poliestero**: sinteza fibro elpensita en la unuaj jardekoj de la 20-a jarcento. Malmultekosta kaj daŭrema.

• **Nilono**: sinteza fibro elpensita en la unuaj jardekoj de la 20-a jarcento. Vaste uzata en eksteraj flagoj kaj en armeaj vestaĵoj.

Hodiaŭ, la lastaj du, nilono kaj poliestero, estas la preferataj teksaĵoj pro la fakto, ke ili estas daŭremaj kaj malmultekostaj. Ankaŭ kotono kaj, en malpli forta grado, silko estas uzataj. Lino kaj lano ne plu estas utiligitaj por ellaborado de flagoj, precipe pro la altaj kostoj.

La plej grava demando estas kiamaniere ni elektu la ĝustan materialon por flago. Nu, ĉio dependas de la flago. Ĉu ĝi estos ekstere aŭ ene de konstruaĵo (ekzemple, en oficejo)? Ĉu la flago estos uzata por specialaj ceremonioj aŭ por ĉiutaga uzado? La plej bona teksaĵo por eksteraj flagoj estas nilono, ĉar ĝi estas eltenema al la vento kaj al la suno (konkrete, al la ultraviola radiado). Aldone, ĝi estas tre malmultekosta. Se ni parolas pri flagoj, kiuj troviĝos ene de konstruaĵoj, ni havas kelkajn interesajn teksaĵojn. Unue, poliestero, kiu, same kiel nilono, estas tre malmultekosta. Due, kotono, vegetaĵa fibro, kiu temas pri majesta materialo en flagoj. Aldone, kotono povas esti satena. Tiamaniere, ĝi estos tre simila al silko, sed sen la etikaj problemoj de bestaj fibroj, kompreneble. Laste, se ni volas uzi flagon en historiaj rekonstruadoj, ni prefere uzu linon aŭ kotonon.

Laste sed ne balaste, ne nur gravas la teksaĵoj. Gravas ankaŭ la pezo de la teksaĵo. Ekzemple, ne ĉiaj kotonoj estas egalaj; oksforda kotono estas teksita tolaĵo, kiu havas pezan teksaranĝon. Same, nilono havas kelkajn specojn: 70D, 210D, 420D, 600D, 1000D... Kompreneble, ne ĉiuj estas uzataj en flagoj, tamen, estas ja grave ilin diferencigi. Pli peza aŭ malpli peza flago estas esenca elekto. Se temas pri ekstera flago, ni devus elekti pli malpeza materialo, ĉar ni volas, ke la flago arte flirtu. Se ni volas male flagon, kiu estos ene de konstruaĵo, ni elektos pli pezan materialon, kiu rimarkigos la belecon de la flagosido.

Kaj vi, kiun teksaĵon vi preferas? Ĉu vi preferas naturajn aŭ sintezajn materialojn? Kiu estas viaopinie la plej bela el ĉiuj?

Verkis: Alejandro Burgos Escalante (alejandroabe@proton.me).

# 2026 - Vintraj Olimpikoj

✍ *Cristina Bollini (Italio)*

La jaro 2026 estas la jaro de la Vintraj Olimpikoj de Milano-Cortina (Italio). Italio fariĝis la scenejo, kie flirtas la flagoj de ĉiuj landoj de la mondo, kune kun la oficialaj flagoj de la Ludoj (Olimpikaj kaj Paralimpikaj).

La oficiala flago estas ĉiam hisita komence de la Ludoj kaj malhisita dum la ferma ceremonio, kiam ĝi estas solene transdonata en la manojn de la reprezentanto de la urbo, kiu gastigos la venontajn ludojn.

La fama flago kun kvin cirkloj (aŭ ringoj), kiu dum la jaroj akompanas la atletojn, estis desegnita en la jaro 1913 de la Barono Pierre de Coubertin (la sama homo, kiu restarigis la Olimpiajn Ludojn), kaj estis prezentita dum la Olimpika Kongreso en Parizo en 1914, kaj uzita la unuan fojon en la jaro 1920 en Antverpeno.

La usona atleto Harry Prieste ŝtelis ĉi tiun unuan flagon (ne komprenante la grandan valoron de la flago), kaj konservis ĝin dum 77 jaroj, redonante ĝin en la jaro 2000 dum la Olimpiaj Ludoj en Sidnejo al IOK (Internacia Olimpika Komitato).

Sur la flago, sur blanka fono estas kvin cirkloj (aŭ ringoj) interplektitaj, aranĝitaj en du vicoj.

La tri supraj ringoj estas blua, nigra kaj ruĝa: la du malsupraj estas flava kaj verda.

La pozicio de la ringoj reprezentas amikecon kaj kunlaboron inter popoloj, kiuj realiĝis per sporto, sed ankaŭ la unuecon de la kvin kontinentoj dum la renkontiĝo de ĉiuj atletoj el ĉiuj anguloj de la planedo.

Laŭ ĝenerala interpreto (se ne oficiale agnoskata kaj adoptata fare de IOK), la koloroj de cirkloj reprezentas la kvin kontinentojn, sed, reale, De Coubertin elektis ĉi tiujn ses kolorojn (ankaŭ blanka fono estas koloro) ĉar estis tiuj ĉeestantaj sur la naciaj flagoj tiutempe ekzistantaj.



Flago de la olimpikaj ludoj (1913 ĝis nun)

La flago de paralimpikaj ludoj estas freŝdata, sed, male al la flago de la Olimpikaj Ludoj, kiu restas senŝanĝa dum pli ol jarcento, ĝi spertis multajn modifojn.

Sur la nuna flago, sur blanka fono, videblas tri kurboj (ruĝa, blua kaj verda), reprezentantaj kaj la movadon (la simbolo nomiĝas «Agitos», kiu memorigas la latinan vorton "*agito*" ("mi moviĝas"), kaj la unuecon de la paralimpikaj atletoj.

La tri kurboj (korpo, menso kaj spirito) signifas ankaŭ dinamismon, forton kaj inkluzivon, memorigante la olimpikan devizon «Spirit in motion» kaj la volon de ĉiu atletoj neniam haltiĝi kaj neniam rezigni, helpante movi la mondon.

La centra punkto, ideale ĉirkaŭita de la kurboj, simbolas la rolon de la Paralimpika Internacia Komitato, kies misio estas kunigi la atletojn el la tuta mondo.

La koloroj, kiel tiuj de la Olimpika flago, estis elektitaj ĉar ili estas la plej ofte uzataj en la naciaj flagoj.

La plej nova versio, aprobita en la jaro 2019, similas al tiu uzita dum la Olimpikaj Ludoj en Ateno 2004, kiu anstataŭis la flagon uzitan dum la Ludoj en Seulo 1998, nomita «Taeguek».

**Unua flago de Paralimpikaj Ludoj**

Flago unue uzita en Seulo en 1998: oni povas vidi la klasikajn koreajn desegnaĵojn, «Tae-Geuk», lokitajn kiel la cirklojn de la Olimpika Flago. Tiu flago estis uzita ĝis la jaro 1994. *(sur la venonta paĝo)* →



Flago uzita depost la Olimpikaj Ludoj de Lillehammer (Norvegio) de 1994 kaj ĝis la jaro 2004.

Sur ĉi tiu flago la nombro de «Tae-Geuk» estis malpliigita de kvin al tri, por plue distingi ĝin de la olimpika flago.



**Unua versio de «Agitos» (2004-2019)**



Dum la Ludoj en Ateno 2004, ekaperis la unua versio de la nuna flago, kiu plutenas la kolorojn, sed anstataŭas la «Tae-Geuk» per la nuna “koma” formo.

**Nuna versio de la jaro 2019**

Okaze de la 30a datreveno de IPK (Internacia Paralimpika Komitato) la koloroj de la emblemo estis pliheligitaj kaj la geometrio de la kurboj estas iomete ŝanĝita.



Ĉiu el la tri elementoj, kvankam malsame aranĝitaj, estas ekzakte egalaj al la aliaj, kaj ĉiuj tri rondiras ĉirkaŭ ununura centra punkto.

La ruĝa, blua kaj verda koloroj estas identaj al tiuj de la Olimpika Flago.




*"Bona" flago, "malbona" flago* estas broŝuro eldonita de la Nord-Amerika Veksilologia Asocio, la plej granda organizo de flagentuziasmuloj kaj scienculoj en la mondo, laŭ aserto de tiu publikigaĵo.

Pere de ĉi tiu eldonaĵo, oni deziras diskonigi la gvidliniojn, ne devigaj reguloj, kiuj povas helpi al projektistoj krei efikajn flagojn, vaste adoptitajn kaj ŝatatajn.

La broŝuro estas libere havebla en interreto, kaj tradukita en kiel eble plej nombraj lingvoj. Kaj nun, jam estas eble legi ĝin en esperanto. Nia VENTO-kunlaboranto Cristina Bollini, de Italio, ĵus ebligis la aperon de la broŝuro en la internacia lingvo.

Dankon, Cristina!

Vizitu https://nava.org/good-flag-bad-flag kaj elektu la esperantan version.

# La fotografaĵo de niaj legantoj



Flago de Kipro en ties ambasadejo en Lisbono (Portugalio)
Majo, 2023
Fotis: C. Pérez.

*Ni invitas ĉiujn legantojn partopreni en ĉi tiu sekcio. Se dum promenado tra via urbo, vi vidas flirtantan flagon, ne hezitu fotografii ĝin. Sciigu al ni pri loko kaj dato de la fotografaĵo, kompreneble ankaŭ pri kiu flago temas.*

*NI ATENDAS VIAJN FOTOGRAFAĴOJN !*

# La Flago de la Druza Popolo

*Lukas Toczki*

La druza Popolo estas unu el la plej fascinaj, hermetikaj kaj nebone komprenataj religiaj kaj kulturaj komunumoj en Mezoriento. Kun tutmonda loĝantaro inter 1 kaj 1,5 milionoj da homoj, ili loĝas ĉefe en la montaraj regionoj de Sirio, Libano, Israelo kaj Jordanio. Dum preskaŭ mil jaroj da historio, druzoj sukcesis konservi sian identencon malgraŭ oftaj persekutadoj, dank'al kombino de strikta religia sekreteco, kohera socia strukturo kaj fervoja lojaleco al la ŝtatoj kie ili loĝas.

Druzismo naskiĝis en Kairo (Egiptio) komence de la 11-a jarcento, tiam sub la regado de la kalifo Al-Hakim bi-Amr Allah. Origine, ĝi aperis kiel reforma movado ene de la islama ŝijaisma ismailismo, instigita de pensistoj kiel Hamza ibn Ali kaj Muhammad al-Darazi, el kies nomo devenas la termino "druzo", kvankam ili preferas nomi sin *Muwahhidun*, kio signifas "monoteistoj" aŭ "unitaranoj".




Meze de la 11-a jarcento, la druza religio definitive fermiĝis al la ekstero, ekde tiam neniuj konvertoj nek geedziĝoj ekster la druza komunumo estas permesataj. Do, kiu naskiĝas druzo, tiu mortas druzo, kaj kiu geedziĝas ekster la kredo, tiu ĉesas aparteni al ĝi.

Kiel dirite, druzoj estas absolute lojalaj al la ŝtato kie ili vivas. Tiel, siria druzo estos siria patrioto; libana druzo defendos la suverenecon de Libano; kaj israela druzo estos fidela civitano de Israelo. Ĉi tiu geopolitika fragmentiĝo kreas kompleksajn situaciojn.

Do, la druza Popolo reprezentas esceptan kazon de kultura transvivado. Sen propra ŝtato kaj sen iam serĉi prozelitismon, ili naĝas en la tumultaj maroj de la historio de Mezproksima Oriento dum jarmilo.

Alie, ne ekzistas internacia aŭ transnacia organizaĵo, kiu agas kiel "registaro de la druza komunumo", ankaŭ ne tutmonda Federacio aŭ ununura politika reprezentanto por la tuta druza Popolo je monda nivelo. Tamen, malgraŭ tio, ja ekzistas la flago de la druza Popolo, kvankam ĝi ne reprezentas ŝtaton aŭ teritorion, sed la kosmologion kaj la spiritan filozofion de ĉi tiu popolo.

**La flago de la druza popolo.**

La flago de la druza popolo ne havas difinitan proporcion, tiel estas ofte videblaj tiuj flagoj kun proporcio 2:3 aŭ 8:11. Plej ofte videbla estas tiu 8:11, kiu similas al la proporcioj de la israela flago, verŝajne por faciligi la amasan industrian produktadon de druzaj flagoj en Israelo.

La druza flago kombinas 5 kolorojn, kvankam ne sur ĉiuj flagoj tiuj koloroj aperas samorde. Tiuj 5 koloroj estas jenaj kaj kun ĉi tiuj signifoj:

- **Verda**: reprezentas la universalan konscion. Ĝi estas la unua emanaĵo de Dio kaj la forto necesa por kompreni la dian veron. Ĉi tiu koloro estas ligita al la figuro de Hamza Ibn Ali, la ĉefa fondinto kaj arkitekto de la druza doktrino en la 11ª jarcento.

- Ruĝa: reprezentas la universalan animon, ĝi troviĝas sub la intelekto kaj estas la forto donanta vivon, movadon kaj ekziston al la fizika universo. La koloro estas ligita al Ismail ibn Muhammad al-Tamimi, la dua plej grava pensisto de la druza kredo.

- Flava: ĝi reprezentas la vorton. Ĝi estas la rimedo por pura komunikado inter la Kreinto kaj la kreaĵo, do la elmontro de la vero en la mondo. Ĝi estas ligita al Baha al-Din al Muqtana, kiu havis decidan rolon en la verkado de la Epistoloj de la Saĝo, la sankta tekstaro de la druzoj.

- **Blua**: ĝi reprezentas la forton de la fizika universo, la dian volon montritan en la kreaĵo kaj la kapablon distingi bonon kaj malbonon. Ĝi estas ligita al Hurr ibn-al Mualla.

◦ Blanka: ĝi reprezentas la elmontron de la dia lumo sur la Tero kaj en la homa korpo. Ĝi simbolas ankaŭ la spiritan purecon, la pacon kaj la saĝon. Ĝi estas ligita al Ali ibn Ahmad al-Sammuki.


Kvankam ĉiam surbaze de ĉi tiuj koloroj, la flago havas malsimilajn formojn, tiel estas eble vidi la druzan flagon laŭ horizontalaj bendoj, laŭ jene:



Kelkfoje, anstataŭ horizontalaj bendoj, estas eble vidi ankaŭ verdan triangulon apud la stango, plus kvar horizontalaj bendoj, ne kvin, ĉar la verda koloro jam aperas sur la triangulo, do ne estas necese meti plian verdan bendon.



Kvinpinta stelo, kun tiuj kvin koloroj, estas ankaŭ simbolo de la druza popolo. Do, ofte estas eble vidi tiun stelon meze de la flago, formanta veran koloran mozaikon.


### Variantoj de la flago de la druza popolo.

Kiam Francio koloniis Sirion en la jaro 1921, unu el la regionoj de tiu teritorio ricevis la nomon *Jabal ad-Duruz* (Druzaj Montaroj). Inter la jaroj 1921 kaj 1924 la flago de tiu aŭtonoma regiono estis jena:



Sur la flago aperas 13 steloj, reprezentantaj tiuj 13 administraciajn dividojn de la franca kolonio.

De la jaro 1924 ĝis 1936 la flago ŝanĝiĝis, la franca koloniigo de la teritorio fariĝis pli evidenta.



Kvankam la druza flago estas sama sur ĉiuj teritorioj kie establiĝis ĉi tiu popolo, do ankaŭ en Israelo, lastatempa varianto de la druza flago estas uzata de tiu komunumo en Israelo. Kvankam la kutima druza flago videblas amase ankaŭ en la juda Ŝtato.



Flago uzita de la israelaj druzaj komunumoj

Fine, estas necese mencii la flagon de la druza komunumo en Sirio, ĉe la regiono Haŭrano, kiu sevkas la tradiciajn kolorojn de la druza flago, kvankam ĉi-foje estas aldonata blanka stelo.





# Fiĝioj: malgranda Ŝtato kun multaj flagoj


✍ *Cristina Bollini (Italio)*

Insuloj Fiĝioj (oficiala nomo: Respubliko Fiĝioj – en la loka lingvo "*Matanitu Tugalala*" aŭ "*Viti*") estas insularo situanta en Oceanio kaj konsistanta el 322 insuloj (nur 106 estas stabile loĝataj) kaj pli ol 500 insuletoj. Pli ol 80% de la tuta loĝantaro, kiu nuntempe nombras preskaŭ unu milionon, koncentriĝas sur la du plej grandaj insuloj: *Viti Levu*, kie situas la ĉefurbo Suvo, kaj *Vanua Levu*.

La unua eŭropano kiu atingis la insulojn Fiĝiojn estis la nederlandano Abel Tasmart en la jaro 1643, kiam li celis la serĉadon de la "Granda Suda Kontinento" aŭ "*Terra Australis*", sed nur pli ol jarcenton poste, la insuloj estis plene esploritaj fare de la kapitano Cook.

La loĝantoj, el melanezia deveno, parolis plurajn oceanajn lingvojn kaj estis organizitaj en multaj familregadoj, kiuj formis ian konfederacion. Dum la 19-a jarcento, multaj britaj setlantoj atingis la insulojn kaj kontribuis al la reunuiĝo de la loĝantoj en la "Regno de Viti", formita en la jaro 1871 el la kuniĝo de la du regnoj de *Bau* kaj *Lau*. La malfacilaj rilatoj inter la indiĝenaj loĝantaroj kaj la setlantoj, kondukis al Fiĝioj iĝi oficiala brita kolonio. La enkonduko de kultivado de sukerkano kaŭzis la alvenon de pliaj enmigrintoj de hinda origino. Pro tio la rilatoj inter la diversaj etnaj grupoj iĝis pli kaj pli malfacilaj.

En la jaro 1971 Fiĝioj sendependiĝis kaj en la jaro 1987 oni forigis la monarkion kaj oni establis respublikon, kies historio, ĝis hodiaŭ, estas markita de pluraj puĉoj (militaj kaj civitanaj) kaj de malstabileco, parte determinita pro la malfacileco de interagado inter la indiĝenaj popoloj, la iamaj anglaj koloniantoj kaj la posteuloj de la indianoj.



La unua konata flago estis tiu, neformale uzita de la jaro 1865 ĝis 1867 fare de la ĉefoj de la "Federacio de la Insuloj", poste anstataŭigita de tiuj de la Regnoj de *Bau* kaj *Lau*, sed pri tiuj flagoj ne ekzistas certaj informoj.

Sendependa Federacio de la ĉefoj de Insuloj (1865-1867)

La reĝo de la reĝlando Viti, *Cakobau*, en la jaro 1871 adoptis flagon, verŝajne devenantan de la simboloj de la metodistaj misiistoj, kiu estis dukolora vertikala drapo blua-blanka, kun ruĝa ŝildo, kie oni povas vidi blankan kolombon. Estas konataj du versioj de ĉi tiu flago: la ŝtata flago kun flava-ruĝa krono, kaj la pli simpla versio sen ĝi.



Flago de la Reĝlando de Viti aŭ Reĝlando de Fiĝioj Insuloj de la reĝo *Cakobau* (1871-1874) Kompleta versio kun krono


En la jaro 1874 la "Brita Kolonio de la Fiĝioj Insuloj" adoptis la klasikan "*Blue Ensign*", bluan drapon kun la flago de Britio en la kantono. Ĝis la jaro 1908, sur la flirt-parto estis videbla klasika simbolo de leono kun krono, poste anstataŭigita per nova kolonia simbolo.

Tiu nova blazono, uzita ĝis la jaro 1970 kiam Fiĝioj sendependiĝis, konsistas el blanka ŝildo sur kiu ruĝa kruco estigas kvar partoj, sur kiuj estas reprezentataj sukerkano, kokospalmo (ĉefaj produktoj de la lando), blanka kolombo (simbolo de paco) kaj kesto da bananoj. Sur la ruĝa supra bendo estas la brita leono kun aldono de kakaokapsulo inter siaj kruroj. La ŝildo estas subtenata de du fiĝianaj militistoj, kiuj tenas en la manoj tradiciajn armilojn kaj sube estas kartuŝo kun la skribaĵo *«Timu Dion kaj Honoru la Reĝon»*.

**Brita Kolonio de la Insuloj Fiĝioj**





Unua flago de la Kolonio uzita inter la jaroj 1874 kaj 1908; sur blanka cirklo estas videbla leono,kiu staras sur la brita krono,kaj la nomo de la kolonio mem.



Flago de la kolonio uzita Inter la jaroj 1908 kaj 1970. La nova kolonia blazono aperas sur la flirt-parto

En la jaro 1970, post atingo de sendependeco, la Insuloj Fiĝioj iomete ŝanĝis la flagon, transformante la bluan koloron al helblua (aŭ lazura), ŝanĝante la proporciojn al 1/2, kaj rekte metante la ŝtatan blazonon sur la flirt-parto, tiel forigante la blankan cirklon, la du homajn figurojn tenantajn la ŝildon, kaj la kartuŝon kun la nacia devizo. Sed kaj la ŝildoportantoj kaj la kartuŝo restis sur la ŝtata blazono.

La helblua (aŭ lazura) koloro simbolas la Pacifikan Oceanon, dum la decido konservi la britan flagon sur la kantono estas klara rilato al la kolonia periodo.






Flago kaj ŝtata blazono, uzataj de la jaro 1970 ĝis nun.






# Lastaj Informoj pri Flagoj



## La Alianco de Sahelaj Ŝtatoj adoptis sian propran flagon

La Alianco de Sahelaj Ŝtatoj estas pakto subskribita en la jaro 2023 de tri landoj de Okcidenta Afriko: Malio, Burkino kaj Niĝero, cele la kolektivan defendon kaj la ekonomian kunlaboradon. En la jaro 2025 dum ministeria renkontiĝo en Bamako (Malio) estis prezentita la oficialan flagon de la Alianco. La standardo konsitas el la jenaj elementoj:

• Verda fono, tra la tuto de la rektangula flago. Ĉi tiu koloro reprezentas kreskon, renoviĝon, esperon kaj diversecon. Krome, ĝi simbolas la vastajn naturajn rimedojn kiujn kaŝas iliaj teritorioj, inter ili: oro, uranio kaj litio, konsideritaj kiel la bazo de la estonta ekonomia suvereneco de tiuj ŝtatoj kaj ties komuna prospero.

• Centra emblemo, kie troviĝas la oficiala blazono de la alianco. Tie videblas: mapo sen limoj, por montri la unuigitan geografion de la tri membrolandojn, desegnitan sen landlimoj.




• Grupo da homoj unuigitaj permane, tio reprezentas la unuecon de iliaj popoloj.

• Baobao kaj oranĝkolora suno: la baobao reprezentas la elstaran rezistemon kaj la profundajn kulturajn radikojn de la regiono, kronita de leviĝanta suno.

• Tri oraj steloj, aranĝitaj laŭ arko super la suno, ili reprezentas la tri fonditajn ŝtatojn de la alianco.

• La teksto: *Confédération des états du Sahel* kaj ĉe la bazo elstariĝas la akronimo en blankaj literoj AES.

## Honduro ekuzos denove malhelbluan koloron en sia nacia flago

Pro la ŝanĝo de registaro en Honduro en januaro 2026, la Nacia Kongreso kaj la institucioj de la hondura ŝtato oficiale revenis al la uzo de la marblua koloro (malhelblua) por la nacia flago. La Nacia Partio plenumas tiel unu el siaj kampanjaj promesoj, tio estas reveni al la tradicia koloro uzata dum jardekoj.

Estas necese memori, ke en la jaro 2022, kiam *Xiomara Castro* prenis la prezidantecon, ŝia registaro ŝanĝis la koloron de la nacia flago al turkisbluo (hela kaj vigla bluo). La kialo de tiu ŝanĝo estis reprezenti pli fidele la honduran ĉielon kaj la akvojn de la Kariba Maro kaj de la Pacifika Oceano. Krome, kvankam depost 1949 la honduraj flagoj estis fabrikitaj en malhelblua koloro pro kutimo, la originala dekreto de la jaro 1866 eksplicite diris, ke la koloro devas esti "turkisblua".





Tamen, la nova registaro asertis, ke la originala leĝdekreto pri la nacia flago mencias la "turkisbluan" koloron, tamen ne aperas difinita ekzakta kolor-kodo, do tiu koloro devas esti interpretita de la reganta politika partio en ĉiu momento, kaj la nova registaro preferis reveni en la tradician malhelbluan koloron de la flago.


27

# Kreskas la nombro de ŝipoj kun falsaj flagoj

La Internacia Marvetura Organizaĵo (IMO), dum la 113-a kunsido de sia Jura Komitato en Londono, avertis, ke la uzo de falsaj flagoj atingis rekordajn nivelojn. Lastatempe oni detektis 529 ŝipojn navigantajn sub “falsaj flagoj”, tiel la standardoj de preskaŭ 40 ŝtatoj estis mis-uzitaj aŭ rekte uzurpitaj de krimaj retoj sen la scio aŭ konsento de tiuj ŝtatoj. Ĉi tiu fraŭdo estas rekte ligita al multiĝo de la tiel nomata “ombro-floto”, temas pri malnoviĝintaj aŭ malbone prizorgataj nafto-ŝipoj kaj kargoŝipoj, kiuj ne havas la devigajn asekurojn enorde.

Ĉi tiuj ŝipoj navigantaj sub falsaj flagoj evitas tiamaniere internaciajn sankciojn, ŝparas kostojn rilatajn al la striktaj maraj sekurecaj reguloj aŭ rekte plenumas kontrabandon de armiloj aŭ kontraŭleĝaj varoj.

La novaj reguloj aprobitaj de IMO celas fermi la pordojn al la trompantoj, pere de strikta kontrolo de la posedanteco de la ŝipo, tiel la landoj devos kontroli la realan identecon de la finaj posedantoj de la ŝipo kaj postuli oficialan dokumentaron, por pruvi, ke la ŝipo estis sukcese laŭleĝe registrita en sia antaŭa registro antaŭ ol doni al ĝi novan flagon. Same, oni kreos Tutmondan Integran Informad-Sistemon pri Marveturado, por aŭtomate dektekti malkongruojn en la identecoj de la ŝipoj.



La uzo de flagoj, kiuj neniel rilatas al la vera nacieco de la ŝipo, kun la celo kaŝi ties veran originon ofte kaŝas aliajn deliktajn agadojn

# La flago-krizo de Belfasto

✍ *José María Rodríguez (Hispanio)*

Dum jarcento, la flago de Unuiĝinta Reĝlando, populare konata kiel «*Union Jack*», flirtis seninterrompe, 365 tagojn jare, sur la kupolo de la Urbodomo de Belfasto. Por la uniisma loĝantaro, tiuj kiuj apogas la kontinuecon de Nord-Irlando en Unuiĝinta Reĝlando, tiu fakto reprezentis la ĉiutagan konfirmon, ke Belfasto estas brita urbo. Tamen, la demografio de la urbo iom post iom ŝanĝiĝis, tiel, post lokaj balotadoj, la naciismaj irlandaj partioj *Sinn Féin* kaj *SDLP*, favoraj al la integriĝo de Nord-Irlando en la Irlanda Respubliko, kunigis siajn fortojn kun la centrisma Alianca Partio, atingante la unuan fojon en la historio plimulton en la urba konsilio kaj forpuŝante la tradician kontrolon de la uniismaj partioj.



Flirtanta brita flago en la Urbodomo de Belfasto (Nord-Irlando)

La naciismaj partioj prezentis komencan proponon por tute forigi la *«Union Jack»* el la Urbodomo, kun la argumento krei “neŭtralan kaj inkluzivan” publikan spacon por ambaŭ komunumoj. La Alianca Partio, serĉante mezan pozicion por eviti konflikton, proponis kompromisan amendon, laŭ kiu la brita flago ne plu flirtus konstante, sed nur dum 18 specifaj tagoj jare. Oni sekvis tiel, la saman protokolon aplikitan al reĝaj kaj registaraj konstruaĵoj en Unuiĝinta Reĝlando, tie la brita flago flirtas nur okaze de konkretaj tagoj, kiel naskiĝtagoj de membroj de la reĝa familio, oficialaj festotagoj ktp.

La nokton de la 3-a de decembro 2012, post debato ŝarĝita de eksterordinara tensio, la Urbodomo aprobis la amendon de la Alianca Partio per 29 poraj voĉoj kontraŭ 21. En tiu ĝusta momento, dum la dekreto formaliĝis ene de la konsilantaro, ekstere komencis tumultoj.

La reago de la uniisma komunumo estis tuja kaj amasa. Por miloj da homoj, la decido de la Urbodomo ne estis komprenita kiel rimedo de administra neŭtraleco, sed kiel kultura humiligo, rabo de ilia identeco kaj neakceptebla koncedo al la irlanda respublikismo. Sentiĝante perfiditaj kaj timante, ke ĉi tio estas la unua paŝo al perforta asimilado en unuigitan Irlandon, ili tuj eliris al la stratoj.

Kelkajn minutojn post la voĉdono, kolera homamaso provis ataki la pordojn de la Urbodomo, alfrontante rekte la agentojn de la Polica Servo de Nord-Irlando (PSNI). Kio komenciĝis tiun nokton kiel spontanea manifestacio transformiĝis rapide en kampanjon de civilaj tumultoj kaj voj-blokadoj, kiu daŭris dum pli ol du monatoj.




La taktikoj de la manifestaciantoj fariĝis ĉiam pli agresemaj. Oni organizis ĉiutagajn blokadojn en la ĉefaj trafikaj arterioj de Belfasto, kio malhelpis la publikan transporton kaj kolapsigis la trafikon. Dum la noktoj, la protestoj finiĝis en krudajn urbajn alfrontiĝojn. La junaj manifestaciantoj uzis benzin-bombojn, ŝtonojn, brikojn, ferajn tubojn kaj altpotencajn artfajraĵojn kontraŭ la komunaj policaj linioj. La polico respondis per la deplojado de akvokanonoj kaj la pafado de plastaj kugloj por dispeli la homamasojn.

La ekonomia efiko de la krizo estis giganta. La protestoj koincidis plene kun la kristnaska aĉetkampanjo kaj la novjaraj festadoj. Pro la ĥaoso en la stratoj, la timo al tumultoj kaj la blokado de la aliroj, la vendejoj, hoteloj kaj restoracioj en la centro de Belfasto vidis siajn enspezojn fali draste, kio kaŭzis multmilionajn perdojn kaj akre damaĝis la turisman reputacion de la urbo, kiun tiom da peno kostis konstrui post la Interkonsentoj de 1998.

La flago-krizo ne nur estis batalita sur la asfalto, sed ĝi kaŭzis tertremon en la politikaj institucioj de Nord-Irlando. La gvidantoj de la plimultaj uniismaj

partioj, kiel la Demokrata Uniisma Partio (DUP), troviĝis en voj-kruciĝo: kvankam ili alvokis al trankvilo kaj al laŭleĝeco, ili ankaŭ pravigis la malkontenton de la bazo, kio, laŭ multaj analizistoj, vigligis la protestojn anstataŭ estingi ilin. Krome, la brita polico konfirmis, ke proskribitaj lojalaj milicaj grupoj, kiel la Ulstera Volontula Forto (UVF), profitis kaj aktive kunordigis kelkajn el la plej perfortaj tumultoj.






La ĉefa celo de la politika kolero ne estis *Sinn Féin*, sed la centrisma Alianca Partio, kiun la uniistoj akuzis pri "perfido" pro tio, ke ĝi klinis la pesilon en la voĉdono. *Naomi Long*, la tiama parlamentanino de tiu partio por la oriento de Belfasto (ĉefe protestanta areo), fariĝis la epicentro de malam-kampanjo. *Long* kaj aliaj konsilistoj de ŝia partio ricevis kredeblajn mortminacojn, leterojn kun kugloj interne kaj suspektindajn pakaĵojn. Pluraj politikaj oficejoj de la Alianco estis atakitaj kaj bruligitaj, kio devigis la sekurecajn fortojn meti la politikistojn sub protekton dum la 24 horoj de la tago.

Je la fino de februaro 2013, la protestoj komencis perdi intensecon pro la fizika elĉerpiĝo de la manifestaciantoj, la aresto de la gvidantoj kaj la treega financa kosto por la mem tuŝitaj komunumoj. La fina bilanco de la krizo lasis profundajn cikatrojn: pli ol 150 policistoj vundiĝis, okazis centoj da arestoj kaj la socia polarizo revenis al niveloj, kiuj ne estis viditaj dum pli ol jardeko.

Hodiaŭ, la sekvoj de tiu krizo daŭre markas la pulson de la urbo. La Urbodomo de Belfasto subtenas strikte la interkonsenton de la 18 specifaj tagoj jare por flirtigi la *«Union Jack»*, plenumante la regularon pri neŭtraleco en la instituciaj spacoj de la urba centro. Tamen, la konflikto de la simboloj ne malaperis; ĝi simple translokiĝis de la centro al la periferio kaj la kvartaloj.

Promenante tra la nuna Belfasto, la videbla divido daŭre estas elokventa. En la kvartaloj lojalaj al la Unuiĝinta Reĝlando, kiel la areoj ĉirkaŭ *Shankill*


*Road*, la stratoj estas inunditaj de britaj flagoj, skotaj standardoj kaj milicaj murpentraĵoj, kiuj reasertas ilian apartenon al la Krono. Kelkajn metrojn for, transirante la tiel nomatajn *"paco-murojn"*, kiuj ankoraŭ dividas fizike la komunumojn, la respublikanaj kvartaloj de la *Falls Road* montras fiere la trikoloran flagon de la Respubliko de Irlando kaj devizojn de nacia liberigo.






Nuntempe en Belfasto, estas eble trovi surmurajn pentraĵojn kun la irlanda aŭ kun la brita flago

---


LIBRO
Flagoj. Historio
Bollini Cristina
Youcanprint , 2022

**€ 37.00**




LIBRO
Heraldiko por komencantoj
Bollini Cristina
Youcanprint , 2025

**€ 15.00**

Akireblaj pere de [www.unilibro.it](www.unilibro.it)

# Esperantaj Flagoj sur aŭtomobiloj

Kelkfoje esperantistoj uzas sian propran aŭtomobilon por diskonigi la ekziston de nia internacia lingvo, pere de algluado de bildo sur la veturilo. Ofte tiu algluaĵo estas esperanto-flago. Ni vidu en ĉi tiu numero, kiu estas la plej bona maniero montri la flagon de la esperanto-movado sur nia veturilo.

En la plejmulto el landoj la regularo pri algluaĵoj sur veturiloj estas strikta, en la senco ke estas tute malpermesitaj glumarkoj, se ili malpliigas la diafanan videblecon de la ŝoforo aŭ ili povas okazigi eraron rilate la identigon de la aŭtomobilo. Do, ni vidu kie kaj kiel esperanto-flago povus esti algluita.



• **Antaŭa glaco**: estas tute ne-rekomendinda meti tian algluaĵon sur la antaŭa glaco de veturilo. Kelkaj regularoj permesas ilin, kondiĉe ke, ĝi ne reduktas la vidkampon de la ŝoforo. Tamen, multe pli bone se la antaŭa glaco de nia veturilo restas tute diafana.

• **Malantaŭa glaco**: ĝenerale oni povas alglui bildojn tiuloke, kondiĉe ke, la aŭtomobilo disponu de du eksteraj retrospeguloj. Same se oni disponas pri ununura retrospegulo, estas eble glui bildon, se la vidkampo de la ŝoforo ne estas reduktita. Do, pro la fakto ke la ŝoforo tra la malantaŭa glaco ĉefe povas rigardi la centran kaj la diagonalan pozicion de la ŝoforo, estus pli konvene glui esperanto-flagon ĝuste malantaŭ la pozicio de la ŝoforo, tiu loko povas varii, se la stir-rado troviĝas dekstre aŭ maldekstre de la aŭtomobilo.




Pozicio de la stir-rado




Pozicio de la stir-rado

Kompreneble, la mezuro de la algluaĵo ne povas esti obstaklo por la vidkapablo de la ŝoforo.

• **Flankaj glacoj**: estas malrekomendinda alglui ion sur la flankaj glacoj de la aŭtomobilo, pro la fakto ke la mekanismo de la fenestro povus esti damaĝita, se sur ĝi estas io algluita.

• **Malantaŭa flanko de la karoserio:** oni povas alglui bildon ie ajn, kondiĉe ke, ĝi ne estu obstaklo por bone vidi la numer-platon. La flago ankaŭ ne povas esti parto de tiu numer-plato. Ankaŭ estas tute malrekomendita aperigi apud la flago akronimojn kiel "E-O", "EO" aŭ "ESP", ĉar tiu povus kaŭzi eraron, ĉar miskomprenita kiel insigno de la nacieco de la aŭtomobilo, tamen oni povas aperigi la vorton kompletan, tiel "ESPERANTO".







Taŭgaj lokoj por alglui esperanto-flagon ĉe la malantaŭa flanko de la karoserio




Estas tute malpermesite fiksi algluaĵon sur la numer-plato




Kvankam la rezulto povas ŝajni alloga, ne estas konsilinde uzi blankan ovalon kun ebla akronimo de Esperanto, pro la fakto, ke ĝi povas okazigi eraron rilate la nacian identigon de la veturilo.




Taŭga loko por E-flago, apud la numer-plato, sed ne sur ĝi.

• **Flankoj de la karoserio:** oni povas alglui esperanto-flagon ie ajn sur la flankoj de la karoserio, kondiĉe ke, ĝi ne kovru tute tiun flankon. Ofte estas malpermesite kovri tute la koloron de la aŭtomobilo. La protokolo de la veturiloj asertas, ke la plej elstara loko estas la flanko kie vojaĝus la akompananto de la ŝoforo, do se ni devas elekti nur unu lokon, pli bone se temas pri la pordo de la akompananto kaj prefere se la flago ne estas tro granda.




Taŭgaj lokoj por alglui E-flagon ĉe la flankoj de la karoserio





Estas malkonsilinde alglui grandegan E-flagon sur la karoserio

Rilate motorciklojn, la plej taŭga loko por alglui bildon de esperanto-flago estas la antaŭa glaco, se ĝi ekzistas. Kompreneble, la bildo algluita ne devas esti obstaklo por la vidado de la ŝoforo dum la stirado.

Menciinda ankaŭ estas la motorcikl-festivaloj, ĉiuj jaroj, kaj en multaj urboj, okazas renkontiĝoj de motorcikl-amantoj, kie troviĝas centoj, foje eĉ miloj da motorciklistoj. Multaj el ili flirtigas sian nacian flagon. Do, se oni deziras montri esperanto-flagon dum tiuj festivaloj, la plej konvena loko estas la malantaŭa flanko de la motorciklo, ĝuste ĉe la centro.





# Veksilologia kuriozaĵo

## *Liĥtenŝtejno kaj Haitio, flaga koincido en 1936*

En la jaro 1936 televido troviĝis ankoraŭ en sia infanaĝo, interreto estis eĉ ne-imagebla kaj datumbazoj de veksilologio estis fizikaj registroj ekzistantaj ĉe la ministerioj pri eksterlandaj aferoj aŭ en marveturaj manlibroj, kiuj ne ĉiam estis sufiĉe ĝisdatigitaj. Do, ĝenerala kono pri flagoj, ĉefe de la plej malgrandaj landoj, ne estis tre diskonigataj.

Unu el tiuj landoj, kiu krome ne posedis ŝiparon, estis Liĥtenŝtejno, eŭropa mikroŝtato troviĝanta inter Svislando kaj Aŭstrio. En la jaro 1921 ĝi oficialigis sian tradician flagon, sur ĝi aperis du horizontalaj strioj, blua tiu supra, kaj ruĝa la malsupra. La bluo reprezentis la alpan ĉielon, kiu ŝirmis la princlandon, dum la ruĝo simbolis la hejmojn de ĝiaj civitanoj.



Vaduzo, ĉefurbo de Liĥtenŝtejno, 30-a jardeko

Alia ŝtato estis Haitio, la unua sendependa nigra respubliko en la mondo. Ĝi situis en la Kariba Maro. Ĉi tiu respubliko uzis flagon naskitan de sia revolucio kontraŭ la franca regado. Kvankam la oficiala dezajno de la haitia flago kutime inkluzivis ĝian blazonon en la centro, tio estas palmarbo kronita per la frigia ĉapo kaj ĉirkaŭita de kanonoj sur blanka fono, la versioj uzitaj por civila kaj komerca uzo en simpligitaj internaciaj reprezentadoj ofte preterlasis la centran blazonon. Do, la haitia flago konsistis en du horizontalaj strioj: blua kaj ruĝa. Bluo honoris la nigran loĝantaron kaj la ruĝo la mulatan loĝantaron. Blanka strio troviĝanta sur la franca flago estis forigita en la haitia flago, ĉar la blanka koloro estis la simbolo de la koloniismo.

Kurioza fakto rilate ambaŭ flagojn okazis en Berlino (Germanio) en la jaro 1936. La tiujaraj olimpiaj ludoj estis la unuaj, kiuj estis vere disvastigitaj pere de




Portoprinco, ĉefurbo de Haitio, 30-a jardeko

amaskomunikiloj. La defilado de la partoprenantoj estus momento de treega soleneco. Ĝuste antaŭ ol la apero de la sportistoj la germanaj organizantoj supriziĝis. La sportaj delegacioj de Haitio kaj Liĥtenŝtejno flirtigus dum la ceremonia saman flagon! Dum la hisado de la flagoj la konfuzo estis absoluta. Ambaŭ standardoj estis identaj, du horizontalaj strioj de egala proporcio, blua supre, ruĝa malsupre.



Inaŭguro en Berlino de la Olimpiaj Ludoj - aŭgusto 1936



En la jaro 1936 la civila haitia kaj la liĥtenŝtejna flagoj estis tute identaj

Oni rakontas, ke atletoj kaj oficiroj de ambaŭ delegacioj rigardis unu la aliajn surprizigitaj kaj kun ekrido, tuj post vidi ke la simbolo, pro kiu ili estis pretaj konkuri, estis kopiita milimetre de la alia delegacio. Feliĉe, la afero ne provokis diplomatian konflikton, ĉar ambaŭ delegacioj komprenis, ke temis pri hazarda koincido naskita de la manko de tutmonda komunikado. Tamen, la fakto, ke en la plej granda sporta scenejo du sendependaj nacioj ne povus diferenciĝi per siaj naciaj koloroj, estis evidenta problemo, kiu postulis urĝan solvon por la estonteco.

## La liĥtenŝtejna kronita reago.

Post la fino de la Berlinaj Olimpiaj Ludoj, la delegacio de Liĥtenŝtejno revenis en la princlandon kun klara tasko. Ili ne povus permesi, ke ilia suvereneco malklariĝu aŭ kaŭzu miskomprenojn en internaciaj forumoj. La registaro, kun la konsento de la reganta princo Francisko Jozefo la 2-a, lanĉis procezon por modifi la dezajnon de la nacia flago. La solvo estis, anstataŭ ŝanĝi la tradiciajn kolorojn, aldoni novan elementon, kiu krome klarigus la monarkan statuson de la lando, do utila por distingi ĝin de kariba respubliko.

Do, la 24-an de junio 1937, Liĥtenŝtejno oficiale adoptis novan flagon. Sur la supra blua strio, proksime al la stango, oni enmetis oran princecan kronon. Oni aldonis signifon, ĝi simbolus la unuecon de la popolo kun la reganta dinastio.



En la jaro 1937 alvenis solvo: Liĥtenŝtejno decidis aldoni princan kronon al la flago, Haitio definitive oficialigis la civilan flagon aldonante sian nacian blazonon.

## La haitia solvo

Por solvi la konfuzon, Haitio decidis oficialigi la enmeton de la nacia blazono en sian oficialan ŝtatan flagon. Do, meze de la blua kaj ruĝa strioj aperus blanka rektangulo kun blazono.

## Heredaĵo de Olimpia eraro

La okazintaĵo de Berlino 1936 estis multe pli ol simpla anekdoto en la historio de sporto. Ĝi montris ke la 20-a jarcento, per amase diskonigitaj okazintaĵoj, devigis la mondon rigardi sin reciproke, interkonektiĝi kaj reguligi aspektojn de diplomatio, veksilologio kaj heraldiko, kiuj antaŭ estis tute ne-atentitaj.

# La angulo de la blazonoj

## *Vatikanurbo*

La blazono, kiu aperas sur la flago de la Ŝtato de Vatikanurbo estas unu el la plej antikvaj kaj videble distingeblaj heraldikaj simboloj en la mondo. Oficiale adoptita en sia nuna formo post la Lateranaj Traktatoj de 1929 -pere de kiuj oni fondis la modernan suverenan ŝtaton de Vatikanurbo-, ĉi tiu emblemo baziĝas sur la katolika teologio, la historio de la papeco kaj la spirita kaj tera suvereneco de la Sankta Seĝo.



La blazono konsistas el tri ĉefaj elementoj:

- La ŝlosiloj de Sankta Petro, aranĝitaj en formo de Sankta Andrea kruco X. ĉi tiuj ŝlosiloj memorigas la tekston de la Evangelio laŭ Mateo, (16: 19-21) kiam Jesuo Kristo diris al la apostoloj: *"Kaj mi donos al vi la ŝlosilojn de la regno de la ĉielo; kaj kion ajn vi ligos sur la tero, tio estos ligita en la ĉielo".*

La ora ŝlosilo reprezentas la spiritan povon de la Katolika Eklezio, kaj la aŭtoritaton malfermi la pordojn de la ĉielo. La arĝenta ŝlosilo reprezentas la politikan jurisdikcion de la Papo super la Vatikana Ŝtato. La rekoj de la ŝlosiloj, tio estas la partoj, kiuj turniĝas ene de la seruro, estas trapikitaj laŭ kruc-formo, kio plifortigas la kristanan karakteron de la simbolo. Krome, la ŝlosiloj estas ligitaj malsupre per ruĝa kordono, tio simbolas la nedisigeblan ligon inter ambaŭ povoj, la spirita kaj la tera, administrataj ambaŭ de la sama aŭtoritato.

Krone, super la ŝlosiloj, videblas la Papa Tiaro, ankaŭ nomita triregno. Kvankam la modernaj papoj ne plu uzas ĝin fizike en siaj kron-ceremonioj, ĝi restas kiel heraldika simbolo de la Sankta Seĝo. Tiuj tri kronoj reprezentas, siavice, la sanktan ordon, kiel Vikario de Kristo; la jurisdikcion, kiel pastro de la Katolika Eklezio kaj la magisterion, kiel supera instruisto. Sur la pinto de la tiaro ripozas malgranda globo surfacita de ora kruco, kiu proklamas la suverenecon de Kristo super la Tero.

Kiel kuriozaĵo oni devas diri, ke tiel aperas la ŝlosiloj sur la vatikanurba flago, tio estas ora ŝlosilo ĉe la stango kaj arĝenta ĉe la flugoflanko. Tamen, sur la oficiala blazono de la ŝtato aperas inverse.



Blazono sur la vatikanurba flago



Oficiala blazono de Vatikanurbo

Post kelkaj semajnoj, okazos la reta renkontiĝo por fondi oficiale la organizaĵon VENTO. Kiel sciate, ni celas pere de tiu asocio:

- Fariĝi la faka asocio de la E-movado, kie renkontiĝos veksilologoj.
- Esti la reprezentanto de la esperanto-parolanta komunumo en la Federacio Internacia de Asocioj Veksilologiaj.

Pro la fakto, ke la plimulto el la proponantoj de la ideo fondi VENTO estas hispanoj, estus konvene oficialigi la asocion laŭ la hispana leĝaro, tamen ĉi tio ne estas nepra kondiĉo, ĉefe se aperas alies opinioj. Tiucele ni jam redaktis proponon por statuto, kiu povas esti sendita al ĉiuj interesitoj, simple sendu mesaĝon tiusence al vento@esperanto.ac

La ret-kunveno okazos dum la monato junio, plejeble inter la 15-a kaj la 30-a de junio 2026. Se la ideo interesas vin, kontaktu kun ni. Ni ankaŭ pli-informos rekte al konataj interesitoj kaj pere de la Telegram-grupo FLAGOJ.

vento@esperanto.ac




# Flagoj kaj poŝtmarkoj

## *La Andora Flago*

La kunprinclando Andoro, suverena mikroŝtato inter Hispanio kaj Francio, ne havas propran ununuran poŝtservon. Do, la poŝtaj servoj de la najbaraj ŝtatoj Hispanio kaj Francio, emisias specifajn poŝtmarkojn por Andoro. De tempo al tempo, tiuj emisiaĵoj rilatas al andoraj simboloj, sed kurioze, dum la hispana poŝtservo aperigas sur siaj bazaj serioj la trikoloran andoran flagon, la franca administracio tradicie preferis dediĉi tiujn bazajn seriojn al la blazono de la kunprinclando.

Lastatempe, ĝuste en la komenco de la jaro 2026 la hispana poŝta servo emisiis bazan poŝtmark-serion dediĉitan al flago de Andoro.

Jen kelkaj konitaĵoj pri ĉi tiu serio.

Emisia dato: la 12an de januaro 2026

Ĉefa bildo: la andora flago.

Poŝta valoro: Tarifo A, 0'96 eŭroj (por naciaj leteroj el Andoro al Hispanio).

Presformato: Ofseto sur kreta, gumita kaj lumlineska papero.

Kvanto: 70.000 ekzempleroj, distribuitaj en folioj de 25 poŝtmarkoj.




Poŝtmarko dediĉita al Andora flago




Unuataga koverto de la poŝtmarko

# *Trovu la eraron!*






La 8-an de oktobro 1992, okazis en Toronto (Kanado) basbal-matĉo inter la kanada teamo *Toronto Blue Jays* kaj la usona *Atlanta Braves*. Deklarita la matĉo kiel *"tago de frateco"* inter ambaŭ landoj, usonaj mar-infateriistoj estis invitataj paradi antaŭ la matĉo. Usonaj soldatoj havis nur usonajn kaj uson-armeajn flagojn, do, lastminute ili devus eliri, improvize, en la sportan kampon kun kanada flago.

Eble pro la urĝo, pro la improvizado aŭ pro la ne-sciado, ili portis inverse la kanadan flagon, kun la centra ruĝa acerfolio renversigita. La eraro estis tiel granda, ke la venontan tagon oni disvendis en la urbo T-ĉemizojn kun la usona flago inversigita.

La tiama usona prezidanto, George Bush, publike pardonpetis kaj kiel signo de repaciĝo, okaze de la venonta matĉo, kanadaj rajdaj policoj estis invitataj porti la usonan flagon kaj la mar-infateriistoj tiun de Kanado, kompreneble jam korekte hisita.

# Veksilologia Humuro




*La proksima numero de VENTO aperos en la monato aŭgusto 2026.*

ESPERANTO

INTERNACIA NEŬTRALA

LINGVO DE PACO

SIMPLA LOGIKA